



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : 5 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1974

N° 53

FEDERACIA LABORKUNSIDO en MONTPELLIER

La aŭtuna laborkunsido de niaj federaciaj estraro kaj komitato okazis en Montpellier la 20-an de oktobro 1974-a.

Dankon al la anoj de la grupo de Montpellier pro la bona aranĝo kaj la samideanaj akcepto kaj helpo.

Iom post la naŭa komenciĝis la laboro.

"Sudfranca Stelo" - Gratulindaj estas s-ro FRUS kaj D-ro SALAN al kiuj ni ŝuldas enviindanfederacian ligilon.

Por harmoniigi la redaktadon de la bulteno estis decidite ke:

- la enpresotaj tekstoj estos nepre sendataj al la sidejo de la federacio (vò bonvolu noti ke, ekde januaro 1975, pro transloĝiĝo de S-ro Llech-Walter, la adreso estos: 72, Avenue Général de Gaulle -66000 Perpignan).
- la kolektitaj tekstoj estos ope sendataj de S-ro Llech-Walter al D-ro SALAN kiu, post korekto, ilin transdonos al S-ro FRUS por presado.

"Sudfranca Stelo" aperas Kvar foje jare kaj la nova jarabono estas 5,00 fr. Mondonacoj kaj kontribuajtoj (artikoloj) estas danke akceptataj.

Subvencio - Ni petos subvencion de la "Regiona Konsilio". Ĉar niaj "Departementaj Konsilioj", Hérault, Gard, Pyrénées Orientales kaj Aude, adoptis favoran deziresprimon pri Esperanto ni havas bonan atuton por esperi subvencion de la "Regiona Konsilio".

Federacia kongreso 1975 - Dato ne estas fiksita ĉar ĝi dependos de la datoj de la nacia kongreso en Tours (ĉu Pasko, ĉu Pentekosto). Ni nur povis antaŭvidi du datojn por la federacia kongreso, ĉu la 16-an de marto, ĉu la 4-an de majo. La grupo de Montpellier zorgos pri la aranĝo de nia federacia kongreso, ĉu en Montpellier, ĉu en ĉirkaŭa urbo.

Financa situacio - La raporton de S-ro DELIGNE vi trovos en tiu-ĉi numero.

Kotizoj 1975 por U.F.E. kaj U.E.A. - La tarifojn vi trovos en la raporto de S-ro DELIGNE. AP la kotizoj aldoniĝas 5,00 ff. por "Sudfranca Stelo". Ĉar S-ro DELIGNE forestos ekde januaro ĝis marto, li insiste petas ke, plej baldaŭ kiel eble, la kasistoj de la grupo sendu al li la liston de la kotizantoj kaj abonantoj samtempe ĝirante la necesan monon, senpere, al la poŝtkonto de la federacio (Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon - C.C.P. 956-28 - Montpellier). Ne sendi ĉekojn al S-ro DELIGNE.

Ni devas bedaŭri, ke ankoraŭ ĉi-jare ne efektiviĝos la deziresprimado de

nia federacio jam esprimita dum la kongreso de Luksemburgo pri unika kaj mezpreza kotizo por U.F.E.

Afiŝetoj - Restas 500. La diversaj grupoj kaj unuopuloj de nia federacio povas mendi, plej baldaŭ kiel eble, ĉe la federacia sidejo. Por vendi la res-tontajn ekzemplerojn ni reklamos en diversaj esperantistaj periodaĵoj. Post elĉerpiĝo S-ro FRUS volonte reeldonos kvanton da tiu malmultekosta kaj celtrafa informilo.

Esperanto-kartoj - S-ro FRUS presigos, kartformate, foton kun permana dediĉo de D-ro ZAMENHOF. Same kiel por la afiŝetoj ni reklamos.

Demandaroj por U.F.E. - S-ro Llech-Walter atentigis la delegitojn kaj grupestrojn pri senprokrasta resendo de la demandaroj.

Lingvaj minoritatoj - S-ro FRANGEUL el Angers skribis pri la rolo de Esperanto ĉe lingvaj minoritatoj. S-ro LLECH-WALTER skribos al S-ro FRANGEUL pri tio.

U.E.A. kaj U.F.E. - S-ro AMOUROUX prezentis raporton kaj projekton de deziresprimo pri la nuntempa situatio.

La raporto kaj la deziresprimo estis unanime adoptitaj post kelkaj etaj modifoj en la teksto de la deziresprimo.

La integralan tekston de la raporto kaj de la deziresprimo vi trovos post tiu-ĉi protokolo.

- o o o -

Je la 14-a, post simpatia kunmanĝo, komenciĝis neformala babilado pri diversaj temoj: Esperanto ĉe skoltoj (D-ino VIERNE), vivo en Grésillon (S-ro DIEZ), vivo de la grupoj, vizito de eksterlandanoj, ktp...

Ni skribos al O.R.T.F. en Montpellier por ke, okaze de la ZAMENHOF-tago, D-ro SALAN estu intervjuata ĉe la regiona televido.

Ni proponas al U.F.E. ke unu el la venontaj naciaj kongresoj okazu en Grésillon. Finance kaj propagande tio certe tre utilos al nia Kulturdomo.

Je la 15-a ĉiu rehejmiĝis kun la impreso ke, en Montpellier, ni bone laboris.

- o o o -

LA NUNA SITUACIO DE U.E.A. KAJ DE U.F.E.

Nia movado trapasas gravan krizon.

Dum la Universala Kongreso en Hamburgo D-ro LAPENNA kaj multvaloraj gvidantoj de U.E.A. ekŝiĝis.

Nova estraro estis elektita.

Mi tute ne volas fari la proceson de la hamburga kongreso, de homoj kaj de metodoj. Mi nur deziras, sen pasio, ŝiĝi al vi la nunan situacion.

Kia ajn estas la opinio kiun ni havas por aŭ kontraŭ la homoj, por aŭ kontraŭ la metodoj, mi opinias ke, dece, ni ne devas aplaŭdi aŭ malkonsenti ĉar, en tiu-ĉi bedaŭrinda afero, ne estas homoj kaj ties konceptoj kiuj gajnis aŭ homoj kaj ties konceptoj kiuj perdis. La sola perdonto riskas esti Esperanto entute kaj tie kuŝas la vera danĝero.

Do ĉar nova estraro de U.E.A. estis elektita ni devas, kondiĉe ke ĝi ne elvojiĝu el la neŭtraleca gvidlinio, ĝin akcepti kaj ne disigi niajn fortojn.

Ni ne faru proceson de intencoj al la nunaj gvidantoj. Estas multe tro frue

por ilin juĝi serene. Ni juĝos, objektive, laŭ rezultoj sed, por tion fari, ni bezonas referencperiodon de agado sufiĉe longan.

D-ro LAPENNA tre saĝe konkludis jene sian festparoladon kiu temis pri la lastjaraj atingoj de U.E.A. kaj pri la nuna situacio - mi citas laŭ la septembra numero de la revuo "Esperanto" paĝo 146-a - : "Sed, se la nova gvidantaro de U.E.A. trovos pli bonajn metodojn, mi estos la plej feliĉa rekoni, ke tiuj metodoj montriĝis ĝustaj". Do ni ankaŭ ne havu antaŭjuĝojn.

Post la hamburga kongreso la estraro kaj la konsilio de U.F.E. kunsidis.

S-ro THIERRY proponis ke estu pridiskutota la ekziĝo de U.F.E. el U.E.A. Voĉdono okazis kaj la propono de estis akceptita.

Sekve de tio la estraro de U.F.E. ekziĝis. D-ro ALBAULT, prezidinto, S-roj THIERRY kaj BOURDEAUX, vic-prezidintoj, ne deziris transpreni funkcion en la nova estraro de U.F.E.

Persone mi estis tre ĉagrenita pro la ekziĝo de tri tre altvaloraĵoj kaj meritplenaj esperantistoj al kiuj ni ŝuldas tre gravajn sukcesojn sur la nacia kaj internacia kampoj.

Ilia foresto estas grava perdo por U.F.E. Tamen U.F.E. devas pluvivi.

Provizora estraro de U.F.E. estis elektita ĝis la venonta nacia kongreso, kiu okazos en Tours.

Ĝi konsistas el:

S-ro GUILLAUME, prezidanto,

S-roj SAUDIAN-ROUSSEAU kaj LE MAGADURE, vic-prezidantoj,

F-ino NOURMONT, ĝenerala sekretario,

S-ro J.A. ROUSSEAU, financoj.

Krome, S-ro GUILLAUME restas ĉefdelegito de U.E.A. por Francio.

Kia ajn estas la opinio kiun ni havas pri la homoj, ni devas saluti ties kuraĝon pro, ĝis la elekto de nova estraro, transpreno de malfacila tasko.

Entiu kriza periodo malbonvenaj estas percirkulera kampanjo kaj aranĝo de kunvenoj kiuj celas "klarigi" sed kiuj, fakte, riskas dividi la esperantistojn en du klanojn.

La nuna situacio resumiĝas al tio:

1° - homoj kaj ties metodoj ne plu gvidas U.E.A. kaj U.F.E.

Ili faris kaj espereble ili ankoraŭ multe faros por Esperanto kaj tion ni devas danke saluti. La cirkontancoj volis ke ili pludonis la torĉon.

2° - homoj kaj ties metodoj de nun gvidas U.E.A. kaj U.F.E. Ni ne faru al ili proceson de intencoj. Ni tamen konservu nian atentan observemon por ilin juĝi laŭ faktoj kiam tio eblos.

Intertempo mi alvokas al la repaciĝo de la koroj. Ni ne laboru por homoj aŭ ni ne plu laboru pro homoj sed ni laboru, unuigitaj, por Esperanto.

Ni ĉiuj bone scias ke labori por Esperanto estas ankoraŭ apostola laboro. Ni bezonas strêĉi ĉiujn niajn malmultajn fortojn kaj ne ili disigi. Pro tio mi diras: ni flankenlasu nian amarecon kaj ni serene laboru en la sino de fortaj nacia kaj universala asocioj.

Antaŭ ol fini permesu ke mi citu al vi paragrafon el retrospektiva artikolo de S-ro THIERRY pri la 75-a datreveno de la franca Esperanto-Asocio (el "Franca Esperantisto" n° 285-a de aprilo 1974-a): "Estas faktoj ke la movado ĉiam prosperis kiam ĝi atingis veran unuigon de la fortoj en agorde kun tre solidara skipo, tio estas de 1911 ĝis 1914, de 1933 ĝis 1939, kaj nuntempe jam de 1962.... Male la dissplitiĝo en malvastajn "kapeletojn" kondukis al plena regresado".

Tio estas la vero kaj mi aldonas: kio validas naciskale validas ankaŭ internaciskale.

Ĉar nia Esperanto-Federacio estas regiona filio de U.F.E. kiu aliĝas al U.E.A., ni devas, lojale, apogi la gvidlinion de U.F.E. kaj de U.E.A.

Mi proponas al vi la adopton de deziresprimo kiun ni sendos al H.F.E., al S-ro GUILLAUME, ĉefdelegito de U.E.A. por Francio kaj al la Rodana-Alpa Federacio kiu, hodiaŭ mem aranĝas interfederacian kunvenon en Liono.

Tiu-ĉi deziresprimo ne celas nin blinde ligi por ĉiam. Ni estu atente observemaj pri la neŭtraleco de U.E.A. sed, intertempe, ni restu unuigitaj en ĝia sino.

Jen do la teksto kiun mi proponas al la aprobo de la ĉeestantaj federaciaj estraranoj kaj komitatanoj:

DEZIRESPRIMO

=====

La estraro kaj la komitato de nia federacio kunvenis en Montpellier la 20-an de oktobro 1974-a. La dato estis fiksita delonge.

Interalie estis diskutita la nuntempa situacio en la sino de U.E.A. kaj de U.F.E. post la universala kongreso de Hamburgo.

Konsiderante:

1°- la eksigon de D-ro LAPENNA kaj la elekton de nova estraro de U.E.A.

2°- la eksigon de la estraro de U.F.E. kaj la elekton de provizora estraro ĝis la venonta nacia kongreso en Tours,

3°- novan kaj bedaŭrindan percirkuleran kampanjon,

la estraro kaj la komitato de nia federacio bedaŭras tiujn personajn polemikojn, kiuj tre malutilas al Esperanto, bedaŭras la eksigon de multvaloraj esperantistoj, alvokas al repaĝo, kaj unuanime esprimas la deziron:

1°- ke oni ne faru proceson de intencoj al la nova estraro de U.E.A. se, politike, ĝi restos neŭtrala,

2°- ke oni ne kompliku la malfacilan taskon de la provizora estraro de U.F.E.

3°- ke oni ĉesu la percirkuleran kampanjon.

"Ni kune foku nian sulkon".

Jean AMCUIROUX

(Federacia sekretario).

Adresatoj:

- U.F.E.
- S-ro GUILLAUME, ĉefdelegito de U.E.A.
- Rodana-Alpa Federacio.





Financa situacio post la Kongreso en Béziers, hodiaŭ 20-an de oktobro 1974.

Jen nia ĝishodiaŭa financa situacio.

Nia tuta havaĵo konsistas el:

Poŝtokonto.....	264,47
Ŝparkaso.....	781,00
Kaseto	135,80

Do, entute ni havas 1.181,27

Kompare kun nia situacio je la sama dato de la pasinta jaro, aperas malpliigo je 36,00 fr. Ĝis nun tio ne estas tre grava.

Sed, kiamaniere evoluos tiu situacio ĝis nia venonta kongreso?

Unuflanke, ^{je la} fino de la jaro, ni ne devas forgesi ke mi devos pagi al S-ro FRUS, la lastan trimestron de SFS, t.e. 150,00 fr.

Sed, aliflanke ni povas supozi ke mi estos enspezintaj la unuajn kotizojn por la jaro 1975.

Ĉu tio-ĉi kompensas tion? Mi ne scias.

- o o o -

U.F.E. sendis al mi novajn tarifojn por 1975.

La okfranka kotizo fariĝis naŭfranka, kaj lasos al ni 1 fr.

La kvindekfranka fariĝis sesdekfranka, sed lasos al ni 5 fr. anstataŭ 4.

La sepdekfranka fariĝis okdekfranka sed lasos al ni 8 fr. anstataŭ 6.

Mi konstatis ke en la jaro 1973, mi ricevis 101 kotizojn, kaj en la jaro 1974 nur 96. Kio okazos en 1975, post aplikado de la novaj kotizoj? Se la parto kiu revenas al la Federacio kreskis, ^{ĉu} la nombro de la kotizantj ne malkreskos?

- o o o -

S. F. S.

Se vi memoras, dum nia kongreso en Béziers, ni decidis konservi la abonprezon por S.F.S. je 3,00fr., sed kreante samtempe kvin frankan abonprezon kiu devis esti konsiderata kiel subtenan abonprezon. Entute, proksimume la duono de niaj abonantoj pagis 5 fr.; sed antaŭ tiu decido multaj estis jam pagintaj sian kotizon. Ni do povas opinii ke tiu decido estis sufiĉe bone akceptita de niaj abonantoj.

De la unua de januaro ĝis hodiaŭ mi ricevis por SFS, 445,00 fr. SED, mi devas konigi al vi ke iu sendis 100 fr. kiel anoniman donacon. Ĉar la anonima persono estas tie, mi opinias ke ni povas varme aplaŭdi ĝin.

Do ni devas konsideri ke ni enspezis nur 355,00 fr. ĉar, bedaŭrind, tiu dankinda gesto certe ne okazos denove.

La 31-ande decembro mi estos paginta al S-ro FRUS 480,00 fr. kaj ni havos deficiton de 125,00 fr.

Plie, ni devas ankaŭ konsideri ke depost la 16-ande septembro la prezo de la poŝtmarkoj kreskis, kaj ankaŭ, ke depost nia kongreso en Béziers, sendube la paperprezo ankaŭ kreskis.

Do, ek de nun, la funkciado de nia ligilo estas deficita, kaj, en la nunaj kondiĉoj tiu deficiito povas nur pliampleksiĝi.

Kion fari, ĉar ni ne estas en kongreso kaj ne rajtas decidi ion.

Eble S-ro FRUS povus antaŭvidi kiaj estos la venontaj kondiĉoj por bona funkciado de nia SFS.

Mi do proponas doni la parolon al li; poste ni povos pripensi pri la afero, eltrovi rimedojn por plibonigi la situacion, rimedojn kiujn ni proponas okaze de la venonta kongreso.

- o o o -

PLIBONIGO de la KASTELO de GRESILLON

Konstrui ĉambregon por la prelegoj kaj kursoj kun la necesa materialo estas eble ambicia, tamen la Kultura Asocio de la Kastelo de Grésillon povis parte helpi.

Sed nun la Asocio dezirus pagi ĉiujn elspezojn por la plibonigo de la kastelo kaj petas la helpon de la esperantistaro.


Eĉ modesta sumo (minimume 5 fr.) estos bonvena sed kiu povas fari pli, akcelos la laborojn.


Sendu la monon al S-ro COUSSE Maurice, 11, rue Alain de Rougé - 72300 - Sablé sur Sarthe (Francujo), aŭ ĝiru al poŝtĉeko 2.512.77 - Nantes.

Koran Dankon.

René LLECH-WALTER.

- o o o -





Lastaj Linioj pri la Hamburga Kongreso

En la antaŭa n-o de nia regiona gazeto mi pritraktis la ĉefan eventon de la lasta U.E.A. - Kongreso: la ekŝigo de Ivo LAPENNA. En la nuna la leganto trovos suprajajn kaj ĝeneralajn informojn pri diversaj aspektoj de l' Kongreso kaj de l' kongresanoj.

- Unue mi parolu pri la kongresejo mem. La samideanoj kiuj partoprenis la lastan U.F.E. Kongreson en Saint-Etienne estis ĉiuj mirigitaj de la amplekso, oportuneco kaj vasteco de l' kongrespalaco kie ili sidis. Tiam grandiozan kongrespalacon ili ja neniam antaŭe vidis.

Ni diru nur ke la hamburga kongresejo estis almenaŭ dekoble pli ampleksa, oportuna kaj vasta.

Tiel estas la germanoj. Ili perdis la lastan tutmondan militon, kaj kian militon! Ili troviĝis nudaj kaj senmonaj sur detruita lando, kaj nune, kaj de kelka tempo, ili superas tutan Eŭropon kaj kapablas konstrui kongrespalacon, kies konstruo kostis al ili proksimume 200 milionojn da markoj. Ĉapelon!

Sed ŝajne ni nune troviĝas malproksime de nia U.E.A.-Kongreso.

Ni do revenu al ĝi.

- Ke tre multe da ĉeestantoj ĝin partoprenis ni ĉiuj certe bone scias, sed vi eble ne scias ke inter ili troviĝis multe da junuloj, multe pli ol mi antaŭe imagis. Mi aldonu ke inter ili oni rimarkis sufiĉe multe da long-kaj eĉ tre longharuloj, ĉefe inter blondaj viroj, sed iliaj haroj estis lavitaj kaj kombitaj, eĉ kiam ili falis ĝis inter la omoplatoj.

- La inaŭgura asembleo estis tiel teda kiel ĉiuj inaŭguraj asembleoj. Parolis sinsekve pluraj dekoj da reprezentantoj de eksterlandaj ŝtatoj aŭ internaciaj organizaĵoj, kiuj diris ĉiuj la samajn resolutparolojn. Inter tiuj, la unua kiu parolis en Esperanto estis la reprezentanto de Israelo, kiu tial ricevis tondran aplaŭdodon.

Post li, sendube kuraĝigitaj de lia ekzemplo, Esperante parolis reprezentantoj de Norvegio, Novzelando, Usono. Pri tiu lasta, I. LAPENNA, kiu prezidis, diris: "Midevas lin aparte laŭdi, ĉar miascie li eklernis Esperanton nur pasintan nokton".

Tiu tedeĝa litanio de sam-parolantoj daŭris ĉirkaŭ tri horojn.

Miaopinie la plej elstara frazo, kiun mi aŭdis dum tiuj tri horoj, estis elparolita de l' sudvjjetnama delegito, ĝi estas: "Esperanto apartenas al la granda aventuro de l' Homaro".

- Fine mi opinias interese sciigi vin pri la ĉefaj punktoj de l' lasta parolado de I. LAPENNA.

Jam dum la unua ĝenerala kunveno li anoncis, ke li ekŝigos el ĉiuj siaj

funkcioj kaj postenoj, el la honormembreco de TEJO.

La 31-ande julio 1974-a, matene, li informis nin pri la kialoj de sia decido. Ni do tre atente aŭskultis lin.

Sed unue mi notu, ke kvankam estis plurloke atentigita en la vasta salono, ke fumo estas malpermesite, kaj kvankam ĉiuj ĉeestantoj observis tiun atentigon, LAPENNA, antaŭ kaj post sia parolado, fumis kaj multe fumis, elspirante la fumon per la naztruo.

Li aspektas mezaĝa, altstatura, minca, kun arĝentaj haroj. Li tre bone oratoras, kaj eĉ ne unu eraron mi aŭdis dum lia duhora parolado. Mi nur rimarkis, ke anstataŭ prononci "vojaĝo" li diras "vuajaĝo".

Mi citas ĉi-sube kelkajn el liaj esprimoj kaj asertoj:

- Nia formulo: loka dialekto en lokaj regionoj;
nacia lingvo en naciaj landoj;
Esperanto en internaciaj rilatoj.
- La angla lingvo estas nia plej granda malamiko.
- Deko da landoj kontribuas al matenmanĝo de Britio.
- Mia filozofia pensado estas materialisma determinismo.
- Ĝis mia morto mi dediĉos ĉiujn miajn fortojn al Esperanto.
- Mi estis elektita prezidanto de U.E.A. dum 1964 -- ĉi jaro.
- Ni ne havas multe da bonaj oratoroj.
- Estas tre gravaj kaŭzoj de mia ekzigito.
- Oni nomis min diktatoro, demagogo.
- Oni akuzis min, ke mi konstruigis mian domon en Londono pere de U.E.A.-mono.
- Oni organizis agadon por min faligi. Tiun agadon partoprenis TEJO, polaj instancoj, ĉekaj, bulgaraj, hungaraj.
- La nova komitato C estis elektita sub politika influo.
- Tiu elekto estas katastrofo por U.E.A. . Estas segado de la Branĉo sur kiu ni sidas.
- Mi ne povas akcepti, ke homoj kiuj ĵetis koton kontraŭ min, estu elektitaj en komitato C.
- Oni komencas malfondi U.E.A.-on laŭ mia profunda opinio.
- Mi rifuzis honoran prezidantecon de U.E.A.
- Mi laboradis 46 jarojn por Esperanto.
- Adiaŭ por ĉiam, vi ne plu vidos min antaŭ vi, nek inter vi.


Fidele raportita de D-ro SALAN, kiu tute sola respondecas pri la enhavo de l' ĉi-supra artikolo.

D-ro SALAN.


5 minutoj da intervalo




Ĉu vere la geinstruistoj strikas ?



La ŝelo de banano.



Sen vortoj.



Sen vortoj.



La kuracistoj rekomendas imunigi kontraŭ malvamumon.




Vi estas tro emociema, sinjoro !

R. FAUS

K R U C V O R T O J

Horizontale *

- 1 - Havanta inklinon al delikataj bongustaĵoj - Malintensa.
- 2 - Presaĵo aŭ teatraĵo - Forta antipatio (R)
- 3 - Tute simila (R) - Ekspliki
- 4 - Ne pli ol - Parto de ŝuo (R)
- 5 - Prepozicio - Provizi per bataliloj - Inklini
- 6 - Kun serioza atento al ies bono - Arunelo (R)
- 7 - Entenanto - Numerala adverbo - Vulkano
- 8 - Numeralo - Maskobalo (R)
- 9 - Bonega afero - Kava velo (R)
Pli malpli daŭre restadi (R)
- 10 - Deziro havi kion iu posedas - Konifero (R)
- 11 - Meritanta ion - En la buŝo
- 12 - Kvanto da disponeblaj varoj - Nordamerika bovo.



R. Raymond.

Vertikale *

- 1 - Lia kapo neniam blankiĝas - Verba finaĵo - 2 - Disciplinaj kodoj - Jara profito pro pruntedonita mono (R) - 3 - Monvida - Ronda konstruaĵo
- 4 - Nomo de cifero (R) - Efiki sur io (R) - Libera (R) - 5 - Konjunkcio pruntedoni al iu difinitan sumon - 6 - Levumbrako aŭ dento ĉe disko (R)
- 7 - Tre malmola tavolo de la terkrusto (R) - 8 - Ne kapabla iri aŭ agi laŭ sia volo
- 9 - Du sinsekvaj literoj - 10 - Kalkulilo (R) - Eligi nevideble - 11 - Rilata al riĉeco laŭtempa sahara rivero (R) - Malvarma vento (R) - 12 - Superulino pro sia rango, merito aŭ talento - 11 - Tio kio tegas, ŝirmas la korpon de animalo - Divida sufikso
- 12 - Besto aŭ homo - Viva plezuro.

* (R) - Nur radiko

* Solvo sur la venonta numero.

K	R	I	S	T	A	L	■	R	E	L	A
V	E	L	U	R	■	U	R	A	G	A	N
A	G	I	T	I	■	N	■	D	A	N	O
R	■	A	V	I	A	D	I	L	O	J	■
T	O	R	N	I	S	T	R	O	■	L	■
A	N	O	■	A	M	I	■	G	L	I	T
L	O	K	A	L	■	K	A	R	E	N	O
O	■	F	R	A	T	O	■	A	R	O	M
■	R	O	B	■	R	■	O	F	T	■	B
P	E	R	U	K	O	■	B	I	E	R	O
I	■	T	S	E	T	S	E	■	C	E	L
G	R	O	T	■	I	B	I	S	O	■	O

Solve
de la antaŭa
krucvortoj

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

Jaro 1974

Sukcesoj en:

- Atesto pri lernado:

Sinjinorino GRAU Lolita (66000 - Perpignan)

Sinjoro THEUILLON Henri (30700 - Uzès)

- Atesto pri praktika lernado:

Sinjoro JULES J. Claude (11 - Narbonne).

J. VINCENT.

- o o o -

VIVO de la GRUPOJ

En Perpignan ekzistas nova kaj ĉiam kreskanta kvartalo, kiu nomiĝas "Le Moulin-à-Vent" kaj kies enlogantaro jam atingis la ciferon 13000.

Interalie kaj de pluraj jaroj la kvartalo havas sian propran sportan kaj kulturen unuigon ("Union Sportive et Culturelle du Moulin-à-Vent" aŭ "U.S.C.M."), kiu ĝuas fortan oficialan apogon.

Laŭ peto de la estraro de la koncerna unuigo, de kelke da tempo, stariĝis Esperanto-sekcio kies adreso estas:

U.S.C.M. - ESPERANTO - Jean AMOUROUX,

1, rue de Sorède, "Moulin-à-Vent,

66000 - Perpignan.

La Esperanto-sekcio funkcias kiel sendependa esperantista grupo.

Publika kurso okazas, po unu horo ĉiusemajne, oficiale sed ne devige, en la publika lernejo de la kvartalo.

Jean AMOUROUX.

- o o o -





* ANGULO DE LA KASISTO *



Kiel ĉiujare, la kasisto sin turnas al vi, kaj konigas la tarifojn de la kotizoj por la jaro 1975.

La ĉisubaj tabeloj estas ekzakta kopio de tiuj kiujn mi ricevis el U.F.E.

Membre adhérent.....	9,00
Membre titulaire.....	60,00
Membre donateur.....	83,00
Membre bienfaiteur.....	128,00

Cotisation unique des membres à vie.....	1.200,00
- d° -	1.660,00
- d° -	2.560,00

La fakoj, estas:

G.E.E. Membres du Corps Enseignant.

J.E.F.O. Membres de moins de 22 ans payant 9,00 ou 42,00 et membres de moins de 26 ans payant 60,00. Dans ces deux cas toujours préciser la date de naissance.

Do, la kotizoj por U.F.E. plus Fakoj estas la jenaj:

Membre adhérent de moins de 22 ans.....	9,00
Membre titulaire de moins de 22 ans.....	42,00
Membre titulaire de moins de 26 ans.....	60,00
Membre donateur.....	83,00
Membre bienfaiteur.....	128,00

Les cotisations uniques des membres à vie, sont les mêmes que celles du tableau ci-dessus.



* ANGULO DE LA KASISTO *



Membres de moins de 22 ans avec Jarlibro	22,00
Membres de moins de 22 ans avec Jarlibro + Esperanto + Kontakto	66,00
Membres de 22 à 25 ans inclus avec Jarlibro	44,00
Membres de 22 à 25 ans inclus Jarlibro + Esperanto + Kontakto	88,00
Membres de plus de 25 ans avec Jarlibro	44,00
Membres de plus de 25 ans avec Jarlibro + Esperanto	88,00
- d° - (cotisation de soutien) ..	264,00
- d° - (cotisation à vie)	1.760,00
Abonnement seul à Esperanto	66,00
Patrono "A" de TEJO (kun Kontakto)	46,00
Patrono "B" de TEJO (ricevas aliajn materialojn)	16,00

Amara estas la pilolo, ĉu ne? sed kiuj prezoj ne altiĝis dum la pasinta jaro?

Kiel mi petis dum la estrara kunveno en Montpellier, mi denove petas:

NE SENDU PLU MONON AL MI, SED SENDU ĜIN REKTE AL NIA

POŝTA KONTO, KIES ADRESO KAJ NUMERO ESTAS LA JENA:

Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon
Chèques Postaux n° 956 - 28 Montpellier.

Ni esperas ke tiuj novaĵoj ne malpliigos la nombrojn de niaj membroj. Cetere oni ĉiam povas aliĝi al kotizo malpli kosta, ol tiu kiun oni pagis antaŭe.

Kiel kutime, mi sendas al ĉiu el vi miajn plej bonajn bondezirojn okaze de la nova jaro. Al ĉiu el vi, agrablegajn kaj feliĉajn finjarajn festojn.


Maurice DELIGNE.

Pour les Automobilistes Espérantistes

Notre ami Jean Guillaume, qui assume jusqu'au Congrès de Tours les fonctions de Président de l'U.F.E., me prie de signaler qu'il reçoit les inscriptions pour l'Association Internationale des Automobilistes espérantistes.

La cotisation de membre à vie n'est que de 6 francs, donnant droit à la réception d'un auto-collant.

Adresser les inscriptions, et chèques à Jean GUILLAUME
Pavillon 66. Résidence de Grasse - 78810 Feucherolles.



Lastminuta informo

KONGRESA KALENDARO

NACIA KONGRESO : En Tours de la 28-a ĝis la 31-a de marto 1975.

FEDERACIA KONGRESO : Dimanĉon la 9-an de marto 1975.

Ĝin organizos la esperantista grupo de Montpellier.

BONE NOTU AMBAŬ DATOJN.

★ Okaze de Kristnasko kaj Jarŝanĝo
ni esprimas niajn sincerajn bondezirojn
al ĉiuj niaj legantoj kaj simpatiantoj.



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot légal : 4^{me} trimestre 1974